

Pri miaj verkoj: arta foto-grafio

Mi komencis fotadon meze de la 80-aj jaroj. Mi posedis propran rivelĉambron por nigrablankaj analogaj laboroj. La kunlaboro (estis preskaŭ lernotempo) kun fotolaboratia asististo formis mian metian kabablecon. Hodiaŭ mi laboras diĝite.

Tiutempe ankaŭ komenciĝis la kontakto kun Lili Fischer, kiun mi ĝis hodiaŭ akkompanas dum ŝiaj ekspozicioj kaj prezentaĵoj kaj helpis per fotografioj kaj videoj. Dum tio mi, kiu estas nefaksperta natursciencisto, ricevis valoran komprenon de la arta kaj muzea laborado, kiujn mi povis bone utili-gi por miaj propraj foto-grafiaj laboroj kaj ankaŭ por miaj honorofica okupo kiel gvidanto de re-gionhistoria muzeo.

Mia arta temo estas la figuraĵo de plantoj kaj floroj kiel memstaraj estaĵoj per fotografio.

Mi aplikas la manieron de portretado de homoj al plantoj. Plejofte mi malligas la plantojn el sia ĉir-kaŭaĵo, bildigas nur partojn aŭ pligrandigas ilin tre forte, ofte tiam oni cerbumas kaj ne scias, pri kio temas la bildo. Mi ankaŭ prezentas nesensaciajn florojn (ekz. de verdaj fazeoloj).

Krome mi ŝanĝas la por ni kutiman rigarddirekton (kiu plejofte estas de supre), kaj mi provas videb-ligi la sunlumon tra la strukturoj de la plantopartoj. Tial miaj verkoj ofte efikas kvazaŭ pentrataj.

Ĉiam denove oni trovas similecon inter miaj bildoj kaj la verkoj de Karl Blossfeldt*.

Mi ankaŭ celas motivigi la rigardantojn, rigardi la bildojn pli detale kaj ekkoni strukturojn, sin ripe-tantajn formojn. Sed mia deirpunkto diferenciĝas de tiu de Blossfeldt: Por miaj artaĵoj mi provas in-kluzivi la sunlumon kiel eble plej multe, ĉar ĝi estas la energia fonto de ĉiu vivo sur la tero.

La sunlumo estas la energia fonto, ni ĉiuj sur la tero dependas de ĝi.

La energio de la sunlumo estas transformta de la verdaj plantopartoj en la plantan korpon, herbovor-aj bestoj el tio rikoltas sian energion kaj ankaŭ karnovoraj bestoj finfine vivas pro la sunenergio.

Tio estas tutampleksa reto, kiu estas plektita dum nekomprenebla longa tempo. Ĝi tute ne estas sta-bila sed kapabla por reagoj. Tio estas avantaĝo por la pluekzistado de la vivantaj estaĵoj. Sed pripen-su (kaj tion ni homoj ja ankaŭ scias): Ĉiu interveno je iu ajn nodo de tiu retaĵo povas detrui la tutan reton je iu ajn loko.

Mi deziras, ke la rigardantoj de miaj bildoj kunprenas hejmen pli bonan komprenon pri la plektaĵo naturo. Kresku iomete la ekkono, ke ni vivantaj estaĵoj ĉiuj sidas en unu boato. Ne-niu renversu ĝin!

* Karl Blossfeldt 1864-1932 estis skulptisto kaj germana fotografisto, kiu famiĝis speciale pro strikte formalaj fotografioj de plantoj.

Fonto: Wikipedia